Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 14an de aprilo 2016 per Skajpo.

Partoprenantoj: Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Mario Machlik, Hilde Dahlberg, Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Herman Ranes.

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 10-an de marto
Aprobita kun kelkaj ŝanĝoj al punkto 7.

2. Ekonomio
Skagen vekst: 49 234
Skagen høyrente: 128 612
Rekreskante post falo en februaro niaj fondusoj nun valoras preskaŭ same multe kiel en januaro.

3. Jarkalkulo
AKB bezonas iom pli da tempo.

4. Jarraporto
UL bezonas iom pli da tempo.
Ni klopodas prezenti la Jarkalkulon kaj la Jarraporton (almenaŭ unu el ili) en N.E. 3/2016
La 27a de majo estas la limdato por sendi enhavon al la redakcio.

5. Peto por subteni aĉeton de Volontula Domo de UEA en Roterdamo
(Vidu leteron de UEA kiun peris Torstein Kvakland, kaj priskribon ĉe
http://www.liberafolio.org/2016/uea-acetos-logejon-en-roterdamo#1457714094325103
kaj http://www.espero.com.cn/2016-03/18/content_38058954.htm)

NEL ne povas kontribui per granda sumo, sed ni taksas tion apoginda projekto. Ni menciu la monpeton en N.E. kaj rigardu, kiel disvolviĝos la monkolektado.

6. Eventualaĵoj
La estraro tralegis kaj diskutis kelkajn ricevitajn komentojn al la januara kaj la februara protokoloj de niaj interkonsiliĝoj.

Ĉar tiuj protokoloj estas ankoraŭ ne publikigitaj, ni faras proponitajn korektetojn antaŭ afiŝado.

Cato Haugen raportis ke li forigis sian librovendejon kaj ke ne plu regas malordo en Esperantonia. La estraro ĝojas! Estrarano Herman Ranes inspektos la ejon dum sia baldaŭa vizito tie.

Raportis Ulf Lunde.

La interkonsiliĝo daŭris de 19.35 ĝis 20.45.
La venonta interkonsiliĝo okazu la 12-an de majo.